

## **XXV ORDINARA TEMPO – 21an de septembro 2014**

### ***ĈU VI ESTAS ENVIEMA, ĈAR MI ESTAS BONA? – komento al evangelio de p. Alberto Maggi OSM***

#### ***El Evangelio laŭ Mateo 20,1-16***

**En tiu tempo Jesuo diris al siaj disĉiploj ĉi tiun parabolon: «Tia estas la regno de Dio: Iu havis grandan vitejon kaj iumatene, frue, li eliris por dungigi laboristojn por ĝia kulturado. Li kontraktis kun ili po unu denaro por la tago, kaj li sendis ilin en sian vitejon. Ĉirkaŭ la naŭa horo li eliris denove, kaj vidis aliajn senokupajn homojn sur la placo. Li diris al ili: "Iru ankaŭ vi en mian vitejon, kaj mi pagos al vi, kiom estas juste. Kaj ili iris. Simile li faris ĉirkaŭ tagmezo kaj la dekkvina horo. Elirinte ankoraŭfoje ĉirkaŭ la deksepa horo, li trovis aliajn homojn. Li demandis: "Kial vi staras ĉi tie senokupe la tutan tagon?". Ili respondis: "Ĉar neniu nin dungis". Li diris: "Ankaŭ vi iru en mian vitejon".**

**Ĉe la sunsubiro la posedanto de la vitejo diris al sia administranto: "Voku la laboristojn kaj pagu al ili la salajron, komencante de la laste venintaj". Li vokis do tiujn, kiuj estis dungitaj ĉirkaŭ la deksepa horo, kaj donis al ĉiu unu denaron. Tiuj, kiuj komencis labori unuaj, supozis, ke ili ricevos pli; sed ankaŭ ili ricevis po unu denaro. Tiam ili murmuris kontraŭ la mastro, dirante: "Ĉi tiuj venis lastaj kaj laboris nur unu horon, kaj vi pagis tiujn egale al ni, kiuj portis la ŝarĝon de la tuta tago sub la suno". Sed la mastro diris al unu el ili: "Amiko, mi ne trompis vin: ĉu vi ne kontraktis kun mi por unu arĝenta monero? Prenu do vian pagon kaj silentu. Se mi volas doni al ĉi tiu lasta, kiom al vi, ĉu ne estas permesite al mi fari per mia mono tion, kion mi volas? Aŭ ĉu vi estas enviema, ĉar mi estas bona al ili?". Tiel lastaj estos unuaj kaj unuaj estos lastaj».**

Ne estas facile akcepti iun Dio kiu, anstataŭ premii la bonulojn kaj puni la malbonulojn, kontraŭe "levas sian sunon sur la malbonulojn kaj sur la

bonulojn” (Mt 5,45), proponante al ĉiuj sian amon. Tia Dio ŝajnas maljusta, samkiel la mastro de la parabolo rakontita de Jesuo (Mt 20,1-15). En ĝi estas prezentata iu terposedanto kiu dungas taglaboristojn por sia vitejo. La graveco de la laboro igas la mastron mem eliri de la hejmo je la sunleviĝo, por iri sur la vilaĝan placon, kaj dungi la laboristojn (Mt 20,1). La taga pago estis unu denaro, kaj tion la mastro certigas al la laboristoj. La granda disponebleco de manlaboristoj kaŭzis ke per unu nura laboristvoko oni povis kontentigi la necesojn de la tuta tago. Male, surprize, ĉirkaŭ je la naŭa matene, la mastro refoje eliras, serĉante aliajn laboristojn. Li ne tion faras pro neceso de la vitejo, la unuaj vokitoj estis pli ol necese, sed li ilin dungas ĉar ili estas ankoraŭ senokupaj kaj esti senlaboraj, en tiu socio signifas ne manĝi. Estas al iliaj bezonoj ke la mastro pripensas. Kaj al tiuj li promesas doni pagon surbaze de la farita laboro (“tio kio estas justa”, Mt 20,4).)

Meze de la tago, la homo iras refoje sur la placon, kaj dungas pliajn laboristojn, kaj same li faras je la tria posttagmeze. Jam en la vitejo estas pli da laboristoj ol necese, sed la mastro pli zorgas pri la fakto ke estas personoj sen laboro ol pri propra intereso. Kaj jam estas preskaŭ sunsubiro, ĉirkaŭ la kvina posttagmeze, kiam la mastro iras serĉi aliajn personojn kiujn neniu vokis al laboro. Mankas nur unu horo al la fino de la labortago, jam neniu plu ilin dungos. Ili ne laboris, do ili ne manĝos. Se neniu zorgis pri ili, ilin prizorgos la mastro de la vitejo, kiu alvokas tiujn labori, sen tamen paroli pri pago: ili laboros eĉ ne unu horon, kaj ili povos esti repagitaj per iom da pano.

La placo de la vilaĝo estas senhoma. Neniu taglaboristo estas tie atendante laboron: ĉiuj estas en la vitejo, kiu estas plenplena je laboristoj. Tiuj kiuj komencis la laboron je sunleviĝo, estis tre kontentaj vidante alveni dum la tuta tago aliajn homojn por ilin helpi en la laboro; dank’ al ilia kontribuo la tago ne estis tro laciga. Ilia feliĉo transformiĝas en entuziasmon kiam ili vidas ke la mastro komencas pagi la lastajn, tiujn kiuj laboris malpli ol unu horon, kaj doni al ili unu denaron: ĝi ne estas pago, tio estas donaco. Se tiuj kiuj laboris unu horon ricevas tion kio estis interkonsentita kun la unuaj laboristoj por unu tuta tago, al tiuj kiuj toleris la lacigon de la tuta tago, al tiuj kiu toleris la pezon de la tago kaj la varmo certe estas donota almenaŭ la trioblo.

Sed kiam tiuj vidas ke ili estas pagataj per unu denaro, kiel estis interkonsentite, ili elverŝas sian seniluziigon kaj sian mishumoron, ĉar ili

certis "ke ili estus ricevintaj plie" (Mt 20,10), kaj opinias la mastron nejusta. La mastro de la vitejo ne estis maljusta (tio kion li interkonsentis estis donata), sed grandanima. Li forprenas nenion al tiuj kiuj laboris ekde la sunleviĝo, sed li volas doni la saman pagon ankaŭ al la lastaj. Defendante sian konduton, la mastro de la vitejo sin difinas bonkora ("Ĉu vi estas enviema ĉar mi estas bonkora?", Mt 20,15). En la konduto de la mastro de la vitejo, Jesuo bildigas tiun de la Patro.

Dio ne estas severa mastro, sed grandanima mastro, kiu ne pagas la homojn laŭ iliaj meritoj, sed laŭ iliaj bezonoj, ĉar lia amo ne estas donata kiel premio, sed kiel donaco. Tio kio motivigas lian agmanieron estas la bezonoj de la homoj, ilia feliĉo. Kaj se al iuj tiu konduto povas ŝajni maljusta, kaj ili ne konsentas pri ĝi, tio okazas ĉar la lia estas "malica okulo" (Mt 20,15), tiu de la avarulo, de la envidulo (Dt 15,9), de tiu kiu ĉion faras pro sia profito. Tiu neniam povos kompreni la agmanieron de iu Dio kiu ne "celas sian intereson" (1 Kor 13,5), sed tiun de la homo.